

Descendo de Jesuo al Infero

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling

Fonto, el kiu estas tradukita:

LOS EVANGELIOS APÓCRIFOS

Colección de textos griegos y latinos

versión crítica

estudios introductorios, comentarios e ilustraciones por Aurelio de Santos Otero

segunda edición

Madrid – MCMLXIII

Interrete:

La originala Latina teksto:

ne trovita

Itala traduko:

Discesa di Gesù agli inferi - Recensione latina "B"

http://www.intratext.com/IXT/ITA0457/___P22.HTM

Angla traduko:

CHRIST'S DESCENT INTO HELL (LATIN B)

[https://books.google.de/books?id=AGZnDAAAQBAJ&pg=PT292&lpg=PT292&dq="CHRIST%27S+DESCENT+INTO+HELL+\(LATIN+B\)"&source=bl&ots=8SscastN96&sig=ACfU3U1nVvCvL7qDQqkqK8q4saxXyC9_zg&hl=de&sa=X&ved=2ahUKEwiMu7jD5LHpAhWdURUIHYeoDOMQ6AEwBHoECAMQAQ#v=onepage&q="CHRIST'S%20DESCENT%20INTO%20HELL%20\(LATIN%20B\)"&f=false](https://books.google.de/books?id=AGZnDAAAQBAJ&pg=PT292&lpg=PT292&dq=)

Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-14.

Descendo de Jesuo al Infero

*DESCENSUS AD INFEROS*¹

1 1 Rabi² Adas, rabi Fines kaj rabi Egias, tri viroj venintaj el Galileo por atesti, ke ili vidis Jesuon forprenita al la ĉielo, leviĝis meze de la Judaj gvidantoj kaj diris malkaŝe al Pastroj kaj Levidoj, kiuj kunvenis por konsiliĝi: Sinjoroj, kiam de Galileo ni iris al Jordan, al ni renkonte venis granda amaso da homoj en blankaj vestaĵoj, kiuj estis antaŭ ne longe mortintaj. Interalie ni vidis tie Karinon kaj Leŭcion: ili venis al ni, kaj reciproke ni nin kisadis, ĉar estis karaj amikoj. Ni demandis: Diru do, amikoj kaj fratoj, kio estas ĉi animo kaj ĉi karno? kaj kiuj estas viaj akompanantoj? kaj kiel vi havas korpon, ĉar antaŭ ne longe vi ja mortis!

2 Ili diris responde: Ni resurektis kun Kristo el la Infero; li mem vekis nin el la morto. El tio vi sciu, ke la pordoj de morto kaj obskuro estas neniigitaj, kaj animoj de sanktuloj eliris kaj ascendis ĉielen kun Kristo la Sinjoro. Ĉar al ni ordonis la Sinjoro mem, ke ni en difinita tempo ekpromenu laŭ la bordoj de Jordan kaj la montoj; tamen ne aperante al

¹ Suplemento aŭ apendico (Latina B) de la t. n. *Evangelio laŭ Nikodemo aŭ Agoj de Pilato*, tradukita el LOS EVANGELIOS APÓCRIFOS, paĝoj 455-471.

² = rabeno.

ĉiuj, nek parolante kun ĉiuj – sed nur kun kiuj plaĉas al li. Ni ankaŭ ne povis aperi aŭ paroli al vi, krom kun permeso de la sankta Spirito.

3 La tuta amaso, kiu ĉeestis, ektimis, tion aŭdante, kaj mirplenaj ili sin demandis, ĉu vere okazis, kion atestis ĉi Galileanoj. Tiam Kajafas kaj Annas diris al la kunveno: Poste malkovriĝos ĉio, kion ili atestis, antaŭe kaj poste. Se montriĝos ke estas vere, ke Karino kaj Leŭcio restas vivaj en sia korpo, kaj se ni ilin per ĉi okuloj povos percepti, tiam komplete vere estos, kion ili atestas; sed tiam ili rakontos al ni ĉion detale. Sed se <statas> male, vi sciu, ke ili mensogis ĉion.

4 Tiam ili rapide interkonsiliĝis, kaj decidis elekti taŭgajn virojn, kiuj timas antaŭ Dio, kaj kiuj scias, kiam ili estis mortintaj kaj entombigitaj: ili detale esploru kaj eltrovu, ĉu statas kiel ili aŭdis. Iris do dek kvin viroj, kiuj ĉeestis ĉe ilia endormiĝo³ kaj kiuj ĉeestis, kiam oni sepultis ilin kaj vidis la tombo-monumentojn. Ili trovis iliajn tombojn malfermaj, kaj multege da aliaj same, kaj ili trovis neniujn spurojn el ostoj aŭ polvo. Kaj ege rapide ili reiris raporti kion ili vidis.

5 Ilia tuta sinagogo estis perturbita en tristo, kaj reciproke ili diris: Kion ni faru? Annas kaj Kajafas diris: Ni sendu al la loko, kie ili estas, reprezentantojn el inter la plej gravaj de la urbo, kaj ni petegu ilin: eble ili bonvolos veni al ni. Tiam ili sendis al ili Nikodemon kaj Jozefon kaj tri Galileajn rabenojn, kiuj konis ilin laŭvide, por peti ĉu ili bonvolas veni. Ili vojaĝis piede tra preskaŭ la tuta regiono de Jordan kaj de l' montaro, kaj revenis, sen trovi ilin.

6 Jen subite el la monto Amaleĥ aperis grandnombra amaso: ili descendis, ĉirkaŭ dek du mil viroj, kiuj resurektis kune kun la Sinjoro. Kiam oni rekonis tie plurajn, oni ne povis ion diri pro timo, kaj pro la vizio de anĝeloj, kaj oni staris defore rigardante kaj auskultante al ili, kiel ili alpaŝas kantante psalmojn kaj dirante: Resurektis la Sinjoro de la morto kiel li diris, ni jubilu kaj ĝoju ĉar li regadas poreterne. Mirplene la

³ Eŭfemismo por morto.

senditoj falis pro timo vizaĝalteren, kaj ili ricevis la konsilon ekserĉi Karinon kaj Leŭcion en ilia propra domo.

7 Ili stariĝis, kaj iris al iliaj domoj kaj trovis ilin kviete ĉe la preĝado. Enirante ili falis antaŭ ili teren, salutis kaj diris: Amikoj de Dio, la tuta amaso de la Judoj sendis nin al vi, ĉar ili aŭdis ke vi resurektis de la morto, kaj ili petas kaj petegas vin veni al ili, por ke ni ĉiuj sciu la grandajn farojn de Dio, kiuj okazis en nia epoko. Laŭ Dia ordono ili stariĝis kaj iris kun ili, kaj ili eniris la sinagogon. La tuta amaso de la Judoj kune kun la Patroj tiam metis en iliajn manojn librojn de la Leĝo, kaj ili priĵuris ilin je Dio Heloi kaj Dio Adonai⁴, je la Leĝo kaj la Profetoj: Diru al ni kiel vi resurektis el la morto, kaj kiaj mirakloj okazis en nia tempo, pri kiuj ni neniam antaŭe aŭdis: ĉar pro timo ĉiuj niaj ostoj rigidiĝis kaj elsekiĝis, kaj la tero skuiĝas sub niaj piedoj; ĉar ni akordiĝis elverŝi justan kaj sanktan sangon.

8 Karino kaj Leŭcio tiam signis permane, ke oni donu al ili rulaĵon da papiruso kaj inkon. Tion ili faris, ĉar la sankta Spirito ne permesis al ili paroli kun ili. Ili donis al ili plurajn foliojn kaj tenis ilin dise en apartaj kameroj. Sed perfingre farante la signon de la kruco de Kristo, ili ekskribis sur la unuopaj rulaĵoj: kaj kiam ili estis pretaj, kvazaŭ unuvoĉe ili kriis el siaj apartaj kameroj: Amen. Ambaŭ leviĝis kaj Karino donis sian tekston al Annas, Leŭcio la sian al Kajafas, ili foradiaŭis kaj reiris al siaj tomboj.

9 Annas kaj Kajafas malfermis la rulaĵon kaj eklegis unuope en silento. Sed la tuta popolo tion ne aprobis, kaj ili diris: Malkaŝe legu al ni, kio estas skribita; kaj postlegade ni konservos tion, por ke la vero de Dio de ĉi malpuruloj kaj trompantoj ne estu distordita per ilia blindeco en falsigon. Annas kaj Kajafas timplene transdonis la foliojn al rabi Adas, rabi Fines kaj rabi Egias, kiuj venis el Galileo kaj sciigis la forpreniĝon de Jesuo en la ĉielon: al ili la tuta amaso de la Judoj kredis, ke ili legu ĉi skribaĵon. Kaj ili legis la paperon kun jena teksto:

⁴ Supozeble tio devas indiki kiel la Judoj nomas Dion JHVH.

2 1 Sinjoro Jesuo Kristo, filo de la Vivanta Dio! Permesu al mi, Karino, ke mi rakontu la miraklojn, kiujn vi plenumis en Infero. Ni estis katenitaj en obskuro kaj tenebro de l' morto en Infero, sed subite granda lumo ĉirkaŭis nin, kaj Infero kaj la portoj de la morto tremis. Aŭdiĝis la voĉo de la Filo de la Plejalta Patro, kvazaŭ sono de granda tondrado; fortege ordonante li jene diris: Viajn pordojn, ho princoj, vi forigu; la eternajn pordojn neniigu; la reĝo de l' gloro, Kristo la Sinjoro, estas preta por eniri.

2 Tiam Satano, estro de la morto, alvenis, timplene fuĝante, kaj li diris al siaj servistoj kaj al Infero: Venu kune! Fermu viajn pordojn, ferajn barilojn submetu, kuraĝe batalu kaj rezistu, ke ni ne kaptiĝu por enfermiĝi en katenoj. Ĉiuj liaj malpiaj servistoj timplene ekfermis la pordojn de la morto kun plena zorgemo, ferajn riglilojn kaj barilojn malrapide ili enŝovis, ĉiujn siajn insignojn fortamane ili tenis, kaj ili ululis per plej hida kaj fia voĉo.

3 1 Tiam Satano diris al Infero: Preparu vin por akcepti, kiun mi transdonos al vi. Sed Infero reagis al Satano: Tio ne estis alia voĉo ol la voĉo de la Filo de la Plejalta Patro, ĉar la tero kaj ĉiuj lokoj de Infero tiel tremis pro ĝi: tial mi kredas, ke ĉiuj miaj katenoj jam kuŝas malfermaj. Sed mi priĵuras vin, Satano, kapo de ĉiuj fiuloj, je viaj kaj miaj fortoj: ne konduku lin al mi, por ke dum ni volas kapti lin, ni ne estu kaptitaj de li. Ĉar se tuta mia forto – ĉe la nura sono de lia voĉo – jam disfalis, kion vi kredas ke okazos se alvenos lia ĉeesto?

2 Satano, estro de la morto, jene respondis al li: Kion vi krias? Ne timu, plej malnova fia amiko mia, ĉar mi incitis kontraŭ li la tutan popolon de la Judoj, kaj mi lasis lin frapi survange, kaj pere de unu el liaj disĉiploj mi igis lin perfidi; li mem estas homo, kiu tre timas antaŭ la morto: pro timo li diris: Trista estas mia animo ĝismorte; kaj al ĝi mi kondukis lin, ĉar nur ĵus levita surkruce li ekpendis.

3 Tiam diris al li Infero: Se li estas la sama, kiu per la nura ordono de sia parolo igis kvazaŭ aĝle forflugi el mia sino Lazaron, jam kvaratagan,

tiam li ne estas homo en sia homeco, sed Dio mem en majesto. Mi petas, ke vi ne venigu lin al mi. Satano diris al li: Tamen preparu vin, ke vi ne ektimu. Li jam pendas surkruce, mi ne plu povas ŝanĝi tion. Tiam respondis Infero jene al Satano: Se vi ne plu povos ŝanĝi ion, jen alvenas via pereco. Mi estos forĵetita kaj restos sen honoro: sed vi estos inter la turmentitoj en mia regno.

4 1 La sanktuloj de Dio aŭdis la debaton inter Satano kaj Infero; ili ankoraŭ tute ne rekonis sin reciproke sed estis tamen rekonantaj sin. Nia sankta patro Adam tiel respondis siaparte al Satano: Estro de la morto, kion vi timas kaj tremas? Jen venas la Sinjoro, kiu nun neniigos ĉiujn viajn faraĵojn kaj vi estos kaptita kaj ekzilita de li poreterne.

2 Ĉiuj sanktuloj aŭdis la voĉon de nia patro Adam, kiel kuraĝe li respondis al Satano, kaj ĝoje ili sin sentis fortigitaj: kunkurante al patro Adam ili ĉiuj amasiĝis. Tiam rigardis nia patro Adam tutan ĉi amason, kaj amplene miris, ĉu ĉiuj ili estis kreitaj el li. Brakumante ĉiujn, kiuj staris apude, verŝante plej amarajn larmojn, li turnis sin al sia filo Set kaj diris: Rakontu, filo Set, al patriarĥoj kaj profetoj, kion diris al vi la gardisto de la paradizo, kiam mi petis vin porti al mi el la oleo de kompato, por oleumi mian korpon, kiam mi malsaniĝis.

3 Li respondis: Kiam vi sendis min al la pordo de la paradizo, mi tie petis kaj demandis plorante la Sinjoron, kaj mi vokis la gardiston de la paradizo, ke li donu el ĝi al mi. Tiam venis la ĉefanĝelo Miĥael kaj diris: Set, kial vi ploras? Vi devas ja scii anticipe, ke via patro Adam ricevos de tiu oleo de kompato nur post multe da teraj generacioj. Ĉar la plej plena filo de Dio de la ĉielo venos al la tero, kaj li estos baptita de Johano en la rivero Jordan; kaj tiam via patro Adam ricevos de tiu oleo de kompato, kaj same ĉiuj kiuj fidis je li. Kaj la homoj, kiuj fidis je li – ties regno daŭros poreterne.

5 1 Ĉiuj sanktuloj, tion aŭdante, denove ekjubilis kun ĝojo. Unu el la ĉirkaŭaj, Jesaja laŭnome, fortavoĉe substrekis: Patro Adam kaj ĉiuj ĉirkaŭaj, aŭdu miajn dirojn. Kiam mi estis surtere, kaj la sankta Spirito

instruis min, en profetaĵo pri tiu ĉi lumo mi kantis: ke nia popolo sidis en mallumo kaj vidis grandan lumon, kaj ke por tiuj en regiono de ombroj de morto leviĝis lumo. Ĉe tiu diro patro Adam kaj ĉiuj aliaj sin turnis kaj demandis: Kiu vi estas? Ĉar vi ja parolas veron. Sed li respondis: Mi nomiĝas Jesaja.

2 Apud li tiam aperis alia, kiu aspektis kiel dezertoloĝanto. Lin ili pridemandis: Vi kiu estas, ke tion vi portas sur via korpo? Li respondis: Mi estas Johano la Baptanto, voĉo kaj profeto de la Plejalta. Mi iris antaŭ la vizaĝo de la sama Sinjoro, por glatigi antaŭ li la dezerton kaj prepari ĉion kiel ebenajn vojojn. La ŝafidon de l' Sinjoro, la filon de Dio mi montris perfingre al la Jerusalemanoj kaj indikis lin. Mi baptis lin en la rivero Jordan. La voĉon de la Patro kiu de la ĉielo sonis super li mi aŭdis proklami: Jen tiu ĉi estas mia amata filo, kiu plaĉas al mi. De li mi ricevis la promeson, ke mem li descendos al Infero.

Tiam patro Adam, tion aŭdante, laŭtavoĉe ekklamis: Haleluja! Tio estas en traduko: La Sinjoro venis.

6 1 Iu alia, kiu ĉeestis tie, rimarkinda pro imperiada signo, David laŭnome, diris proklame: Kiam mi estis surtere, mi malkaŝis pri la mizerikordo de Dio kaj ke li vizitadis sian Popolon, profetante la estontajn ĝojojn, dirante porĉiame: Liaj mizerikordoj laŭdos la Sinjoron, kaj liaj mirakloj gloros la filojn de la homoj, ĉar bronzajn pordojn li trabreĉis kaj ferajn riglilojn li rompis. La sanktaj patriarĥoj kaj profetoj tiam komencis rekoni sin reciproke, kaj ĉiuj rakontis pri siaj propraj profetaĵoj. Tiam diris Jeremia, ekzamenante siajn profetaĵojn, al patriarĥoj kaj profetoj: Kiam mi estis surtere, mi profetadis pri la filo de Dio, ke li estas vidita surtere kaj parolis kun la homoj.

2 Ĉiuj sanktuloj tiam eklaŭdis pri la lumo de Dio, pri la aspekto de patro Adam kaj pri la respondoj de ĉiuj patriarĥoj kaj profetoj, kaj ili proklamis: Haleluja: Benata estas kiu venis nome de la Sinjoro: pro ilia laŭta kriado ektimis Satano, kaj li serĉis eliron por fuĝi. Sed tio ne estis, ĉar Infero kaj ties satelitoj tenis lin fermita en Infero, sen eblo eskapi. Ili diris al li: Kial vi tremas? Neniamaniere ni permesos vin eliri el ĉi tie. Sed

prenu tion sur vin, kiel decas, de tiu, kiun ĉiutage vi kontraŭbatalis; se ne, sciu, ke ekzilate de li vi restos sub mia gardateco.

7 1 Denove sonis la voĉo de la filo de l' Plejalta Patro, kvazaŭ sono de granda tondrado: Levu viajn pordojn, princoj, kaj leviĝu la eternaj pordoj, kaj eniros la reĝo de gloro. Tiam ekkriis Satano kaj Infero: Kiu estas tiu reĝo de gloro? Per la voĉo de l' Sinjoro sonis la respondo: La forta kaj potenca Sinjoro: la Sinjoro forta en batalo.

2 Post tiu sono venis homo, kies aspekto estis kvazaŭ rabisto, kun kruco surŝultre, kaj li kriis defore: Malfermu por mi, ke mi eniru. Satano iom malfermis por li, kaj enlasis lin en la loĝejo, kaj denove fermis post li la pordon. Ĉiuj sanktuloj vidis lin tre klare, kaj tuj diris. Via aspekto estas tiu de rabisto. Diru do: kio estas kion vi skuas surdorse? Humile li respondis: Mi estis vera rabisto, kaj la Judoj krucumis min kune kun mia Sinjoro Jesuo Kristo, filo de la Plejalta Patro. Mi nun antaŭiras antaŭ li, li mem sekvos tuj poste.

3 Sankta David tiam kolerege proklamis kontraŭ Satano: Pleja malpurulo, malfermu viajn pordojn, ke la reĝo de gloro eniru. Same ĉiuj sanktuloj de Dio leviĝis kontraŭ Satano, volis ekkapti lin kaj disŝiri lin. Denove interne estis klamate: Princoj, levu viajn pordojn, leviĝu la eternaj pordoj, kaj eniros la reĝo de gloro. Denove demandis Infero kaj Satano je tiu klara sono: Kiu estas tiu reĝo de gloro? Denove estis dirate de tiu mirinda voĉo: La Sinjoro de la virtoj: tiu estas la reĝo de gloro⁵.

8 1 Jen subite ekstremis Infero, la pordoj de la morto kaj ĝiaj rigliloj neniigis, la feraj traboj rompiĝis kaj falis teren, kaj ĉio malfermiĝis⁶. Satano restis en la mezo, staris konfuzite kaj ĉagrene, kun piedkatenoj ĉe la kruroj. Kaj jen la Sinjoro Jesuo Kristo venis en klareco de ĉiela lumo,

⁵ En tuta ĉi teksto estas pluraj citoj kaj duoncitoj el la Biblio; sed Psalmoj 24:7-10 ĉi tie ripetiĝas.

⁶ Oni pensu pri Dante kaj ties *Infero* kie rompita ponto ankoraŭ atestas pri tiu ĉi descendo de Kristo: vidu en la traduko de Kalocsay, ĉe la 11a Kanto kaj ĉe la 18a Kanto belajn klarigajn bildojn. *Infero* 21:112-114.

milda, granda, humila, portante katenon per siaj manoj: tiun ĉe la kolo li ligis al Satano, kaj ankaŭ ĉe la dorso li ligis liajn manojn: li ĵetis lin malsupren en Tartaron, metis sian sanktan piedon al li sur la gorĝon, dirante: Tra ĉiuj jarcentoj multege da malbono vi faris, neniamaniere vi ripozis: hodiaŭ mi do transdonos vin al la senĉesa fajro. Li rapide alvokis Inferon, kaj ordonis al li: Forigu tiun ĉi plej fian, plej aĉan, kaj tenu lin sub via gardateco ĝis la tago, kiun mi ordonos. Li ekprenis lin kaj malaperis kun li sub la piedoj de la Sinjoro en la profundon de l' abismo.

9 1 La Sinjoro Jesuo Kristo, Savanto de ĉiuj, plena kaj plej milda, tiam resalutis bonvoleme al Adam kaj diris: Pacon al vi, Adam, kune kun viaj filoj per senfinaj jarcentoj. Amen. Patro Adam tiam ekkuŝis⁷ ĉe la piedoj de la Sinjoro, kaj post restariĝo li kisadis liajn manojn, kaj diris forte plorante: Jen la manoj, kiuj min formis, atestante al ĉiuj; li diris al la Sinjoro: Vi alvenis, reĝo de gloro: por savi la homojn kaj por komenci vian regnon por eterne. Ankaŭ nia patrino Eva sammaniere ekkuŝis al la Sinjoro antaŭ la piedoj, kaj restariĝinte kisadis liajn manojn, kaj profunde plorante ŝi diris: Jen la manoj, kiuj formis min, atestante al ĉiuj.

2 Ĉiuj sanktuloj tiam komencis adore ekkrii: Benata kiu venas en la nomo de la Sinjoro: Dio la Sinjoro eklumis al ni. Amen poreterne. Haleluja por eterne de eterneco. Laŭdo, honoro, virto, gloro, ĉar el la alto vi venis viziti nin. Kantante Haleluja kaj jubilante pri gloro ili kunkuris sub la manoj de la Sinjoro. La Savanto tiam ĉion ekzamenis kaj formordis parton de Infero; kun sama rapido kiel li ĵetis parton en Tartaron, li kunportis parton kun si al la ĉielo.

10 1 Ĉiuj sanktuloj de Dio tiam demandis la Sinjoron, ke kiel signon de sia venko li lasu sian krucon en Infero, por ke ĝiaj plej fiaj servantoj ne povu retenigi kulpigiton, kiun pardonis la Sinjoro. Tiel okazis; la Sinjoro metis la krucon meze de Infero: estas signo de venko kaj restos ĝis eterne.

⁷ Laŭlitere: alruliĝis al ...

Tiam ni ĉiuj eliris de tie kune kun la Sinjoro, kaj ni lasis Satanon kaj Inferon en Tartaro. Al ni kaj multaj aliaj estis ordonite, ke kun nia korpo ni resurektu, por doni ĉi-monde ateston pri la resurekto de nia Sinjoro Jesuo Kristo kaj pri ĉio, kio okazis en Infero.

Tio ĉi, plej karaj fratoj, estas, kion ni vidis kaj ni atestas pri tio, ĉar vi igis nin ĵuri pri tio. Li estas nia atestanto, li kiu por ni mortis kaj resurektis – kaj ĉio okazis komplete, kiel estis skribite.

11 1 Kiam ĉio ĉi estis legita tutaĵe, ĉiuj, kiuj ĝin aŭdis, falis vizaĝaltere, amare plorante kaj kruele batante al si la bruston, kriante kaj dirante: Ve al ni! Kiel okazis ĉi tio al ni mizeraj? Fuĝis Pilato, fuĝis Annas kaj Kajafas, fuĝis Pastroj kaj Levidoj, krom tio <fuĝis> ankaŭ la popolo de la Judoj, plorante kaj dirante: Ve al ni mizeraj! Sanktan sangon sur la teron ni elverŝis.

Tri tagojn do kaj tri noktojn panon kaj akvon ili neniamaniere gustumis, kaj neniu el ili reiris al la sinagogo. La trian tagon tamen revenis la kunveno, kaj oni legis la alian paperon, tiun de Leŭcio: kaj oni trovis en ĝin nek pli nek malpli, eĉ laŭlitere, ol kion enhavis la skribaĵo de Karino. Tiam perturbiĝis la sinagogo, kaj ili ĉiuj lamentadis 40 tagojn kaj 40 noktojn, atendante de Dio pereon kaj venĝon. Sed la plena plejalta pardonanto ne tuj neniigis ilin, ĉar li donis al ili larĝan eblecon por penti. Sed ili ne montriĝis indaj konvertiĝi al la Sinjoro.

Tio ĉi estas la atestaĵoj de Karino kaj Laŭcio, plej karaj fratoj, pri la filo Kristo de Dio, kaj pri liaj sanktaj faroj ĉe Infero: al li ni ĉiuj donu laŭdon kaj gloron tra la senfinaj jarcentoj da jarcentoj. Amen.
